



ilala  
esperanta  
revuo

SUB PATRONADO DE ITALIA KATEDRO DE ESPERANTO  
A DAKLET ELDONANTO S VITO AL TAGLIAMENTO

## FRANCISKANAJ ELDONAĴOJ

Al ĉiu Esperantisto, precipe katolika, ne devas manki la sekvantaj libroj:

*JUS ELIRINTA:*

P. MODESTO CAROLFI, O. M.

## LA REFORMANTO

*Popola biografio de S. FRANCISKO EL ASSISI*

*Dua eldono kun antaŭparolo de F. Pizzi — 88 pp. kun 17 ilustraĵoj*

Prezo Liroj 6.—

## La Floretoj de S. Francisko

ANTIKA MONUMENTO DE ITALA LITERATURO

*Esperantigitaj de F. PIZZI — 174 paĝoj*

Prezoj: Sur dika papero L. 8 — Sur maldika papero L. 6

P. M. CAROLFI

## LA PADOVA LILIO

*120 paĝoj kun 23 ilustraĵoj*

Prezo Liroj 5.—

P. S. DE CAROLIS

## A S S I S I

MIRINDAĴOJ DE LA FRANCISKANA URBO

Prezo Liroj 2.—

Mendojn kun antaŭpago al Eldonejo A. Paolet, S. Vito al Tagliamento

### Poŝtmarkojn Kolektantoj!

Mi vendas:

3000 miksitajn poŝtmarkojn por Sm. 1.50

2000 ĉiujn diversajn p. m. > > 5.—

3000 > > > 12.50

Porto aparte. Mono antaŭe.

Prezlisto senmone. Plej malmultkostaj prezoj.

Skribu al Willy Georg Schutze, Dresden A. 16, Pfothenhauerstr. N. 31, Germanujo.

### Ŝango - Korespondo - Aĉeto!

Kiu al mi sendas bezonatajn poŝtmarkojn de sia lando, ricevos laŭ sia deziro: aliajn poŝtmarkojn aŭ librojn, poŝtmarkkolektlibron, monon aŭ komplezojn.

Aeroleteron agrabila. Salutante

Willy Georg Schutze, Dresden A. 16, Pfothenhauerstr. 31, Germanujo.

# itala esperanta revuo

Direttore: A. PAOLET

Comitato di Redazione: Prof. C. GRAZZINI, Prof. B. MIGLIORINI, Ing. R. ORENGO, Dott. A. TELLINI

XIV JARO<sup>a</sup>

JULIO-AŬGUSTO 1927<sup>a</sup> (V jaro)

N. 7-8

## FRANCISKANA NUMERO



S. FRANCISKO EL ASSISI

## Alvoko de la Itala Ĉefministro B. Mussolini

**L**A plej altan genion en la poezio per Dante, la plej kuraĝan marveturanton tra la oceanoj per Kolombo, la menson plej profundan por la artoj kaj por la scienco per Leonardo; sed Italujo per S. Francisko donis ankaŭ la plej sanktan el la Sanktuloj al Kristanismo kaj al la homaro. Ĉar kune kun la alteco de la talento kaj de la karaktero, estas de nia gento la simpleco de la spirito, la entuziasmo de la idealaj atingoj, kaj, kie necesas, la virtutoj de la forlaso kaj de la oferdono. Anstataŭ estas per la Sanktulo el Assizi, unua laŭ la ordo inter tiuj granduloj, ke Italujo, kvankam ankoraŭ fermata en la kruda penado de la mezepoko, ekmontras, por tiel diri, la unuajn signojn de sia reviviĝo kaj certigas siajn renovigantajn kvalitojn de gentileco kaj de homamo.

S. Francisko, jam partopreninta la komunuman bataladojn, subite levigas, kiel transheriginta, sur la flamiĝanta ondigo de la pasioj de la jarcento, levigante, kun la Krucio per la seka mano, la gloraĵajn signojn de la karito kaj de la paco. Restariganto de la religio de Kristo, li estas ankaŭ unu el la unuaj niaj poetoj, kaj tute certe la unua, kiu al la poezio de la unuaj tempoj donas karakterizan, profundan kaj universalan enhavon. En la lingvo, en kiu, post unu jarcento, Dante verkis la *Komedion*, li, la Sanktulo de la malriĉeco, verkas la Kanton de la kreitaĵoj. La fervoro de apostoloj revivigas,

subita kaj trenanta, en lia itala animo, kontraŭa al la ripozo kaj ne kontenta pri la terlimoj, tro mallargaj por sia dezirego de malŝparemo.

La ŝipo, kiu orienten portas la proklamanton de la nemortema doktrino, enhavas sur sia sekura ŝipantaŭo la sorton de la raso, kiu revenas sur la vojon de la prapatroj. Kaj la sekvantoj de la Sanktulo, kiuj post li aliris al orientolandoj, estis misiistoj de Kristo same kiel misiistoj de italeco. Dume sur la tombo respektigita en la deklivo de Subazio, kiu flamiĝis per flamo sen estingigoj, la naskigantaj artoj italaj rapidis starigi, en magia impulso de reago, la templon de ĉiu sugestoplena beleco, tiel starigis la agemeco kaj la arto franciskanaĵ. kiuj, sursignitaj de la itala stilo, disiris en la mondon. Kaj hodiaŭ ĉie, en ĉiuj landoj de ĉiuj kontinentoj, kie estas lumigo kaj humileco de agoj je nomo de la Sanktulo starigitaj kaj suferitaj, tie estas signo de Patrujo nia. En la jaro 1926\* finiĝas 700 jaroj post la morto de S. Francisko, kaj Italujo, kun noviginta animo, pli taŭga por ĝin senti, sin turnas al memoro de la altega instiganto.

Italoj en eksterlando, kiuj sin preparas lin festi en siaj grandaj kunsidoj, en la sanktejoj kaj en la lernejoj, en la asocioj kaj en la rifugejoj de la karito, estu fieraj, povi akompani, en la grandega rito, la feston de Italujo, el kie levigis al la mondo tiel mirinda tagiĝo.



LA KRUTA ŜTONO

## FRANCISKANA SPIRITO

**L**A filo de Petro Bernardone, interese ma komercisto, tuj sin montris (kontraŭ la teoria fenomeno de la heredeco de la sentoj) ĉma al la malavareco, kaj alvenis al vera amo, al la malriĉeco jam antaŭ sia konvertiĝo, kaj laŭ natura sento de delikateco, kiu frue konatigis en li artistan animon, enamiginta de la naturo,

Tiuj ĉi du karakteroj, kiuj pligrandigante aperos al ni en reciproka rilato, tute formas la ĉefajn kordojn de la spirito de la Sanktulo el Assizi.

Jam dum la fruaj tempoj de sia tiej dirita konvertiĝo, Francisko sin montras vere sankta pro iu karakteriza punkto de sankteco, la heroa humileco. La sankteco estas tute eksterordinara donaco de Dio, donaco, kiu tuj kaŭzas la profesion de profunda humileco: la animo je intima kontakto kun la senfineco sentas sian neniecon; la ĉesto de Dio havas en la humileco sian plej veran kaj propramo-

van forton. Kaj ni trovas Franciskon el Assizi vere humila tuj post lia vojo de Damasko, post la renkonto kun la leprulo, momento sendube grava por lia konvertiĝo, tra kiu li jam eniris en sian *curriculum*, en la vojon lumoplenan de la sankteco.

Sed kiam li eniras en ĝin, kia estas la forto kaŝita, kiu lin puŝas? La respondo ne estas malfacila: la amo al la malriĉeco, fariĝinta spirito de malriĉeco, akcentis kaj enradikigis, ĝis kiam ĝi fariĝis kompleta forlaso, la neniigon, kiu epose aperis en la dialogo kun la fratino Safineto de Dio pri la vera gojo; kompleta forlaso kaj tuta nudeco, kiu estas mal-estimo al la kreitaĵoj egoisme konsideritaj, sed libera entuziasma konsidero de la naturo filino de Dio, propramove aperas sur la lipoj de la malriĉulo de Assizi, en la sankta gajeco de la plej absoluta humileco, la kanto de Frato Suno.

Sed se Francisko el Assizi trovis en sia inklino la altiron por fariĝi la sankta malriĉulo, estas ankaŭ certe ke por tio li bezonis ricevi puŝon al li alveninta de la ĉielo: por gajni tiujn superegajn altecojn la animo de S. Francisko devis posedi la lumon de iu idealo. Tiun idealon li ricevis de la Evangelio. Lia regulo devas esti nur normo, dokumento por vivi laŭ la Evangelio: kaj la vivo de Francisko estas la fidela kaj la tuta eĥo de la Evangelio kiel ĝi revivas en lia paĝo plej bela kaj klara, la parolado sur la Montego, la feliĝegecoj: *Beati pauperes spiritu.... vendite quae possidetis.... et respicite volatilia caeli....* Francisko estas ĝia vivanta karniĝo: kun sia flikita robo, la senŝuaj piedoj, sen ŝtono sur kiu kuŝigi la kapon, sen io, kun granda kontenteco en la estaza koro, sub la rigardo de la granda ĉiela Patro por rigardadi liajn kreitaĵojn.... Kaj tia estas ankoraŭ Francisko kvankam.... grandigita de l' idealo evangelia, aliformiginta en fidela kopio de Kristo, kiu sur la monto Verna, en absoluta malriĉeco, sed en la ĝojego de la tuta naturo gloriiganta la Kreinton, fine signos lin per la sanktaj cikatroj, signo de gloro kaj superhoma sufero. Sed, kiel la Evangelio de Kristo estas la bona novaĵo nekaŝita kaj

silenta, sed malkaŝe montrata en ĉiu angulo de Palestino kaj en la tuta mondo, tiel oni ne povas supozi Franciskon, la nova evangeliiŝto, hermetike enfermita en si mem; en grandega amo tute evangelia li devis laŭte krii en la mondo: « *Imitatores mei estote sicut et ego Christi* ». Tiel laŭlonge la vojo de la Malriĉulo, vera sekvanto de Kristo, are kuris la uloj, ĉiuj malriĉuloj sindonintaj al la malriĉeco kaj al la evangelia rifuzo. Senŝuigas Egidjo, senŝuigas Silvestro, Bernardo, Leono kaj Maseo.... naivaj kreitaĵoj, naskiĝintaj por ĉirkaŭsian Majstron, ne, sian fraton Franciskon.

Sed la evangelia idealo, realigita de Francisko, nur estis imitebla de malgranda kvanto da personoj eksterordinaraj; ne gravas; aliaj zorgos por ĝin adapti al pli modestaj fortoj. Ĝi devas daŭrigi por montri la veran franciskan spiriton de la kompleta evangelia rifuzo en la perfekta spirita ĝojo; tutmonda formo kiel la Evangelio, al kiu pli malpli ni ĉiuj povas alproksimiĝi kun deziro ĉiam pli granda de evangelia perfektigo: ĉiujn el la altaĵoj benas la sankta Malriĉulo el Assizi.

*Pax et bonum.*

*Pastro D-ro ALFONSO FERMI  
Prof-ro en la Episkopa Seminario de Piacenza*



## ARISTOKRATECO DE S. FRANCISKO

**S.** FRANCISKO el Asizi apartenas nek al Patriciaro nek al Nobelaro, sed novan nobelecon de la spirito kaj de vivo li kreis, altirante sur sin la simpatian de la tuta mondo per sia serafa ekzemplo. Tutmonda ekzemplo, kiel tutmonda estis la misio de S. Francisko, kaj taŭga al ĉiuj homkondiĉoj de la so-

Tio povas okazi per vere nedifinitaj nuancoj; kaj tio estas la apartigo el teraj kaj mondaj aferoj; tio estas la spirito de kristana toleremo kaj sobreco en la vivado; tio estas la grandanima fideleco al la devo; tio estas la kristana humiligigo, kiu diversmaniere turnigas kaj intime kunigas la animon al Dio, deveno de ĉiu bono; tio estas la spirito de boneco, de karito, de frataj bonvoloj laŭ la ebleco de ĉiuj, tiel ke ĉiuj povas ĉien vere dissemi la pacon kaj la bonon: *pax et bonum.*

Bonvolu Dio, ke el la honorigo, per kiu oni volis testi S. Franciskon, kiu ŝajnis, ni diras, jam tro itala, dum li apartenas al ĉiuj same kiel S. Antonio ne nur apartenas al sia patrujo, al Portugalujo, bonvolu Dio, ke la Italoj fariĝu post la honorigo mem vere pli franciskanaj, fervore franciskanaj; kion oni ne atingas sen la elektivigo kaj la enkonduko en la praktikon, en la ĉies vivmaniero, de la instruoj de la Sanktulo.

*L. S. PIO XI.*

(Parolado al Romana Patriciaro la 8-an de Januaro 1927).



Katedralo de Assisi (S. Rullno)

cieto, al ĉiuj vivmanieroj, kiuj volas est vere kristanaj, kvankam la karakterizo de tiu ĉi Sanktulo okazas de la fakto ke li levigas al altecoj de kristana perfektigo ne al ĉiuj atingeblaj, ne al ĉiuj devigataj, ĉar ne ĉiuj estas alvokataj al tiuj mirakloj de vera kaj reala malriĉeco, de tiel severa pento, de tiel ĉiela amo, de tiel serafa karito. Jam estas, en tiuj ĉi supraĵoj, io, kio estas por ĉiuj aŭ devas fariĝi komuna morala bieno de tiuj, kiuj volas pasigi vivmanieron en kiu estu eminenta la spirito vere franciskana.



*Jus eliris:*

P. M. CAROLFI, O. M.

## La Reformanto

*Popola Biografio de*

**S. FRANCISKO EL ASSISI**

*Dua eldono pli ampleksa, kun ilustraĵoj*

Prezo L. 6.—

A. Paolet, eld., S. Vito al Tagliamento



## La centjara datreveno kaj la Itala Nacio

LA itala Ŝtato, por festi la renovigitan religian fervoron de la Nacio, elektis inter la Sanktuloj tiun, kiu eble pli bone inter ĉiuj detruis la kulpigon de la indiferecenteco en la itala popolo.

Efektive S. Francisko enkarnigis en si mem kion pli kontrastas, la indiferecentecon, kion la religia spirito pli specifike kaj pli mirinde enhavas, la serafan fervoron; tia fervoro, kapabla ŝangi en perfektan gojon tion, kio al la homa naturo plie malŝatas, tio estas la absoluta ofero de la gojoj, de la bonstatoj, de la bienoj, de la grandecoj, de la koleroj; perfekta gojo, kie, naskiginta de la dia amo, transpasas tion, kio povas ŝajnigi nea forlaso por fariĝi vera radiado de amo en Dio al ĉiuj homoj, al ĉiuj kreitaĵoj, kaj konkludi en bondeziro kaj en tutmonda ago de paco.

Ne sufiĉas: Francisko, kontraŭ la religia mallaboremo, malbone alskribita kiel malinda honoro de nia gento, ne estas ekzemplo izolata. Ĝi estas la pruvo pri la danĝereco de simila alskribo. Ĉar la ilago de li suprenlevita kontraŭ ĉiu persista logaĵo de la mondo, per religia heroeco estis tuj sekvita de grandega aro da riĉuloj kaj malriĉuloj, nobeloj kaj ne nobeloj, kiuj altirtaj laŭ lia vojo nur de dia amo, sin oferdonis kun li por renovigi sin mem, la eklezion kaj la homan societeton. En ĉiuj tempoj Italujo donis sanktulojn; do en ĉiuj tempoj ĝi montris, ke kredi ĝin kontraŭa al la vera religia vivmaniero, estis kalumnio: sed en neniua kazo ĝi tiel tuŝeble tion ĉi montris kiel en la belega kaj neniam subirinta franciskana movado. Pro tio Sankta


Francisko, doninte por ĉiam al la Italoj la bonan religian nomon, estas vere « la plej itala el la Sanktuloj ».

Jen kion la nova regadformo komprenis kaj volis.

La Ŝtato, kaj kun ĝi la Registaro, estas nek predikanto nek apostolo; oni ne povas pretendi ke ĝia rememorigo tiel konsideru la Sanktulon en la serafa pleneeco de liaj virttoj, ke ĝi egalvaloru kaj superfluigu la religiajn rememorigojn, kiujn oni faras al li, kaj kiuj atingas lian tutan revivigon en la animoj.

Sed, kiu dirus, ke la oficiala interhelpo danĝeras pro tio la sanktajn apoteozojn, tiu montrus domaĝan malgrandecon de animo. Registaro, kiu intencas restarigi sur altaj fundamentoj la disciplinon de la naciaj spiritaĵoj, vidas la ekzemplan kaj grandegan valoron de kiu firme triumfigis en si mem kaj ĉirkaŭ si, je imitado de Kristo, la leĝon de la spirito sur la leĝo de la membraro; Registaro, kiu kuraĝe rompas la malbonan oficialan tradicion, proklamante en la fakto, ke ne la eksterlanda herezo, sed la enlanda sankteco apartenas al la glora historio ankaŭ civila de Italujo, plenumas agon ne sole mirindan, sed indan de la plejgranda aplaŭdo de tiuj — kaj ili estas la katolikoj — kiuj rajte deposed multaj jaroj plendas la apartigon apatian kaj mokigan de la civilaj aŭtoritatoj el la solenaj manifestacioj de ĉia intime religia itala vivo. Se tion la bonuloj ĵugis granda bono, kiel oni povos sincere ne konsideri bona la novan sintenadon malkaŝe kontraŭan?

F. CRISPOLTI



KANTO DE LA KREITAĴOJ

## FRANCISKO KAJ LA NATURO

SANKTA Izidoro diradis: « *Dio ekvidigas sian belecon, kiu ne povas esti limigata, de la beleco de la kreitaĵaro, limigata kaj ĉirkaŭskribita, ĉar la homo revenu al Dio tra la samaj vojoj, tra kiuj ĝi jam malproksimiĝis; pro tio, kiu por la amo al la belecoj de la kreitaĵaro malproksimiĝis de la belececo de la Kreinto, denove traŭtrante tra la harmonioj de la Kreitaro, revenu al la belecoj de Dio* ».

Estas necese pripensi pri tiuj ĉi vortoj por kompreni tion kio estas la franciskana reformo, kaj kion riprezentas en la historio de nia civilco la apero de S. Francisko,

Aŭ fremdiĝi de la realeco, kiu nin ĉirkaŭas kaj malgrandigi sian ideon kaj neniigi la animon, aŭ enpenetri en la diritan realecon kune kun la animo de

S. Francisko: neniua alia vojo estas por sin savi. En la lumo la aferoj ŝtupare sin disponas por supreniri al Dio.

Mi sentas profundan kortuŝon kiam mi havas la okazon viziti kelkan silentan monaĥejon de discipuloj de la Sanktulo. Tie ĉi en la silento kaj en la preĝado vere ĉeestas lia animo. Nenion franciskan mi trovas en la bruigantaj urboj; kaj nenio estos de Li eĉ la monumentoj, kiujn oni proponas por Li starigi.

La monumento de la Sanktulo estas en la naturo; kiu scias rigardi la aferojn en ilia vera lumo malkovras lian figuron. Oni ekvidas lian malpezan paŝon ĉirkaŭ ĉiu florplena bedo, kaj kiu ne aŭdas en la trilo de la birdoj kelkan noton de la *Kanto de la Kreitaro*?

A. ANILE



## LA VIRINO KAJ LA FRANCISKANISMO

**K**IU la unuan fojon legas la vivon de Francisko el Asizi, unue, sub la impreso de siaj eksterajoj, ne scias bone kompreni iun evidentan kontraston, kiu klare ekzistas en la tuta vivo de la Sanktulo, kontrasto, kiu jam aperis al la seriozaj studentoj kaj praktikantoj de la franciskanismo, kiel Gemelli (fr. Gemelli en la revuo « Fiamma viva » kajero 10, 1926). Se Francisko el Asizi de kelka diletanto de monda mistikeco estis montrita kiel enamiginto de la steloj, predikanta al la turtoj, same kiel la perfekteco estu nur tie enfermita, la Eklezio, kiu pri tia Sanktulo ne prizorgas, povas anstataŭ lin montri kiel « ĉiu serafa en la amo », kiu sin levigis super la homa naturo tra la plej maldelikataj kaj teruraj humiligoj. Al la spirito de la mondo tiu kontrasto nek aperas, nek povas aperi, anstataŭ ĝi formas harmonion tute necesan en la montrado tiel aliformigita kaj malvera de la Sanktulo el Asizi: ni volas diri pri la intimeco, kiun Francisko uzis kun kelka virino.

Do estas mirige vidi la Sanktulon, kiu tiel severe sufokis en si mem ĉiujn dezirojn kaj la mondajn amemojn, eĉ la plej laŭlegajn, kiu tioman severecon de instruoj donis al la regulo de siaj fratoj pri la neceseco eviti la amikecon kun kiu ajn virino, pritrakti anstataŭ per tiom da dolĉeco kun Klaro el Asizi, lia unua sekvantino, kaj kun Jakobino de' Settesoli (Sepsunoj).

Kaj pro tio li mem kelkafoje havis necertecon kaj dolorigan dubon, kiel oni povas konstati en kelkaj legendoj kaj epizodoj de la franciskana floraro.

— Fratino, ĉu vi komprenis, kion diris la personoj pri ni?

Kaj Klaro ne respondis al la dolora peto, farita en tono ankoraŭ pli dolora de la buŝo de Francisko, kiu ĉiam kutimis paroli kun ĉiela goĵo. Ili foriris el domo kie, petinte por trinki iom da akvo, oni ilin akceptis kun malicaj ridetoj kaj vulgaraĵoj kaj dusencaj frazoj.

Ili marŝis solaj sur la neĝo, preskaŭ je la vintra sunsubiro: ĉirkaŭe premis tomba silento; kaj tiu silento estis vere peniga; Francisko rediris:

— Estas necese malkunigi. Vi povas ja sola reveni al monaĥinejo kaj vi tien certe alvenos antaŭ la noktigo; mi iros kien min kondukas nia Sinjoro.

Klaro silentis ankoraŭ pro troa malgoĵego; poste:

— Patro, ĉu ni ne plu revidos nin?

— Eble, kiam burĝonos rozoj, kie nun estas la neĝo.

Sed ĉirkaŭe, improvize, ĉiu arbo, sekiginta pro la neĝo kaj la frostoj, estis kovrita de ĉiukoloraj rozoj. Kaj de nun Klaro kaj Francisko ne plu malkunigis. La timo pro la skandalo, la karito al proksimumaro puŝas Franciskon malproksimigi el Klaro. La ideo ke Klaro iom sin okupu pri li kaj ke ŝi ne estu do tute de Dio pro lia malhelpo, tiel lin premas, ke li ne povas plu stari kaj ŝajnas al li ke la vojo, sur kiu li marŝas, malflosigu sub liaj piedoj por lin engluti; pro tio dolorigita kaj preskaŭ sensenta li sin apogas sur la rando de iu puto por ripozi: sed pro ĉiela virto sur la spegulo de la akvo, kiu reflektas la puran lazuron de la umbra ĉielo, Francisko ekvidas la vizaĝon de Klaro, bela kaj luma kiel vitro kisita de la suno, ĉirkaŭita de dia brilado, trankvila kiel vizaĝo de anĝelo por simboli la altegan purecon de ŝia



LA KANTO AL FRATO SUNO

spirito. Kaj de nun li ĝuis grandan konsolon.

Do se Francisko, jam konante la danĝerojn kaj la malkonvenojn de la kunesto inter la viro kaj la virino, malpermesante ĝin eĉ per preskaŭ tro granda severeco al siaj fratoj, elektis por si tiun sintenadon, ni devas konkludi ke ne devenante ĝi tute absolute de konsentoj permesitaj al la sento, restante ili, verdire, tre puraj kaj sanktaj, ĉar li tute ne povos eĉ iomete permesi tiajn ideojn, tiuj devenoj sin apogas sur la altegaj katoj de la misio, kiun la Sanktulo alskribas al la virino. Do kiel tio povas mirigi Franciskon? Ankaŭ la turtoj kaj la griloj de la herbejoj, kiuj replenigas la kamparon umbran per delikataj triloj, havas sian mision en la mondo!

Do jen ke la kunfuzeco klariĝas: sed ne por ke ĝi estas realaĵo, sed por ke ĝi, enpenetrante en la radikoj de la spi-

rito, al ni montras, per sia ĉeesto, la katojn de sia ekzisto.

La virino havas tre altan mision por plenumi en la mondo: ŝi aperas dum la vivo de la Homo Dio, ĉirkaŭita de nemortema lumo; ŝi rebrilas de angela lumo ĉirkaŭ la serafa figuro de la Sanktulo: la virino povas plenumi la plej malfacilajn batalojn flanke de la viro por la milito de la regno de Dio: kaj se Francisko sciis rifuzi la riĉecojn por edziĝi kun madono malriĉeco, Klaro sciis rifuzi la riĉecojn kaj la blazonon por vivi en malvarmo kaj en malsato.

Kiu devas defendi la ordenon de la petolaj atakoj de la reformo, kiu insiste frapas la pordojn post la transiro de la Patro, devos esti vere Ŝi, Klaro, virino, kiu kontraŭbatalos eĉ la Sanktan Patron, respondante al la insistaj demandoj ke li absolvu ŝiajn pekojn, sed ne de la religia promeso de la plej rigida malri-

ĉeco. Kiu devos konsili Franciskon pri la plej grava decido de lia misio, ĉu ĝi estu ankaŭ aktiva aŭ nur ermita, estos vere Ŝi, Klara, virino, kiu respondos per mirinda ekvilibro: « La Sinjoro ne alvokis vin por vi sola, sed por savi multajn animojn ».

Se la viro atingis la forgeson de sia karno kaj li sciis nur vivi la spiriton, se tiu viro havas grandajn misiojn por plenumi, se li frigas reformanto, kiu devas signi vojon al multaj, ja povas pri tiu ĉi demando peti helpon al virino: kaj ambaŭ fariĝos kapitanoj de du armeoj ordigitaj, kiuj poste aparte marŝos, laŭ paralelaj vojoj, kun unueco de vizioj kaj celadoj, pro la komuna deveno.

Tiamaniere Klara kaj Francisko komencis sian suprenirantan almarŝon; malantaŭ ili sennombra aro da sanktulinoj kaj sanktuloj, tra la jarcentoj, sekvas la postsignojn de la Patro, ĉar Klara estis la tre fidela rebrilo de lia spirito.

En la mondo la tria franciskana ordeno signos, de Jakobino el Settesoligis Elizabeto el Hungarujo, vojon de humileco kaj de perfektigo. La spirito de la Patro neŝanĝite transpasas en la filojn, kun mirinda beleco, dum la jarcentoj: Bernardeno el Sieno, de la minoritoj, estos dum la mezepoko, la kavaliro, la kuraĝa defendanto de la grandeco de la misio virina en la mondo, kaj fiksos en sia grandega predikado

tiun ĉi sigelon de neforigebla kaj ĉiama aktualeco.


La Franciskanismo estis, en la Eklezio, kun sia alta konsidero pri la virino, la plej forta detruo de la malserioza kaj sengusta feŭda idealeco.

Post kiam la kastelo de grafoj Scifi (Sifi) perdis la angelan belecon de Klara kaj la promesantan junecon de Agnezo, la palacoj de la nobleco de Asizi, la dometoj de la humilaj, paŝo post paŝo senhomigis de la plej delikataj kaj belegaj virinaj belecoj kiuj, altiritaj de alloga idealo, iris por sin kaŝi inter la parietoj de la monaĥinejo, sin vesti je sako, kaj tranĉi la harligojn.

Tiamaniere mankis al feŭdaleco la objekto por siaj kantoj kaj sonoj: la virino estis malavara en la rifuzo kaj en la sinofero, kiel Francisko antaŭvidis; de ŝi devis deveni la fatala puŝo, por ke al la viro trompita povu ŝajnigi en ĝia kompleteco ĉiu malpleneco de la feŭda idealo, kaj lin levigi tiel al pli altaj konsideroj de la vivo.

Kaj nun kiam la vojo estas signita, nun kiam Klara lumigos ĝin per neestingebla pureco de lumo, en ĉiu junulina animo, kiu alcelas la atingon de la Eternulo kaj de la vero, renovigas, sur la sojlo de la vivo, en ĉiuj jarcentoj, la sekreta dramo de la unuaj franciskanaj knabinoj.

RINA CRENNA  
instruistino



S. FRANCISKO SENDAS SIAJN MONAĤOJN PREDIKI EN LA MONDON

## ..... S. FRANCISKO KAJ ROSTAND .....

UNU el la plej famaj francaj poetoj, Edmondo Rostand, sin inspiris al Asizi por la kvara akto de *Chantecler* [Santekler] titolita: « La nokto de la najtingalo ».

La sceno okazas en la arbaro, en la horo dolĉa kiam la suno subiras, horo de la « ombro, kiu simpligas, de la paco, kiu konsolas ».

« En la tuta arbaro, ĝis okulvido, kunikloj alcelas la vesperon », kaj en tiu ĉi dia momento de silento kaj de malvarmeto, mil voĉoj inter la folioj « diras la preĝon de la vespero », la preĝon de la birdetoj. Unu el ili komencas:

« Dio de la birdetoj, kiu por fari nin malpezaj, metas aeron en niaj ostoj, kaj por nin beligi metas la ĉielon sur niaj

plumoj, dankon por tiu ĉi bela tago, por la fonto kie ni trinkis, por la grenoj, kiujn niaj malgrandaj bekoj dise trovis, por esti doninta al ni taŭgajn okuletojn, kiuj vidas la nevideblajn malamikojn de la homoj; por esti doninta al ni, ĉar ni estas ĝardenistoj, bonajn, malgrandajn ilojn el korno, blondajn aŭ nigrajn, kiuj estas tranĉiloj por detru la nestojn de la raŭpoj ».

Alia birdeto daŭrigas:

« Morgaŭ ni batalos la kardojn kaj la vulpojn. Pardonu al ni, tiun ĉi vesperon, niajn pekojn por ke ni senvestigis du aŭ tri ribarbetojn ».

Tria:

« Sinjoro, se la nedanka homo, jetante al ni ŝtonojn, pagas nin por ke ni lin



MORTO DE S. FRANCISKO (Benozzo Gozzoli [Benoco Gócoli])


gojigis per la triloj kaj ni savis lian panon de insektoj; se nia familio falis en iun kaptilon, rememorigu al ni S. Franciskon el Asizi kaj ke estas oportune pardoni al la homo ĝiajn kaptilojn, ĉar viro diris: « Miaj fratoj birdoj! ». Kaj vi, Francisko, granda sanktulo, kiu benis niajn flugilojn, preĝu por ni ».

Poste, unu post la alia, kiel en litanioj:

« Predikanto de la hirundoj, konfesanto de la najtingaloj, preĝu por ni... ».

« Petu por ni, Francisko el Asizi, la grajnon de hordeo, la grajnon de tritiko, la grajnon de milio! ».

Kaj ĉiuj voĉoj de la birboj kune, « en murmuretado, kiu aliras ĝis la lasta limo de la arbaro » respondas: « Tiel estu, tiel estu, tiel estu! ».



TOMBO DE S. FRANCISKO

## La sonorilego de la militfalintoj

LA 4<sup>a</sup> de Oktobro de jaro 1925, la tagon dediĉitan al S. Francisko, en Rovereto (Italujo) ega nova sonorilo eksonorigis por la rememorigo de la militfalintoj dum la pasinta tutmonda milito.

La ideo ke ĉiuvespere je la 21.30 el la tero suprenlevigu bronza voĉo de speciala sonorilo, kiel fervora preĝo de la

vivantoj por la falintoj de ĉiu ajn lando, estas vere delikata ideo de fratamo, kiun precipe la esperantistoj devas koni.

Kaj estis tute oportune ke la unua ekfrapo estu forfluginta la tagon de la gloro de S. Francisko, ĉar la spirito de la Sanktulo de l' fratamo, daŭrigas sian mision en la mondo.



Do ĉiuvespere el la tero la voĉo de benita sonorilo supreniras al ĉielo, kaj ĝiaj sonoraj ondoj estas rezervataj ekskluzive por la militfalintoj.

Kaj unufoje dum la jaro la sonorilo, post la kutimaj ektuŝoj, sonorigas por la militfalintoj de iu preciza nacio.

La « Komitato por la Sonorilo » stariĝis la sekvantajn datojn por la specialaj rememorigoj:

9 januaro	por la militfalintoj de	Turkujo
22 marto	»	Rusujo
9 aprilo	»	Portugalujo
30 majo	»	Usono
15 junio	»	Ĉeĥoslovakujo
27 junio	»	Montenegro
22 aŭgusto	»	Germanujo
30 aŭgusto	»	Aŭstr. kaj Hung.
11 septembro	»	Francujo
15 septembro	»	Serbujo
22 oktobro	»	Belgujo
29 oktobro	»	Anglujo
4 novembro	»	Italujo
7 novembro	»	Japanujo
27 novembro	»	Bulgarujo
1 decembro	»	Rumenujo

Jam ĉirkaŭ la « Sonorilo » naskiĝis legendoj kaj ĉiuj Nacioj alcelas al ĝi per speciala kulto de amo. Ĝi post la *Tombo de l' Militisto Nekonata*, estas la plej sankta monumento de la pasinta milito.

Unuvoĉa konsento donis al ĝi kaj por ĝi konservas la titolojn de *sankta*, de *pia*, de *respektinda*.

Pri tiu plensignifa « Sonorilo », kiu ce-

las la tutmondan fratamon kaj forte ligas la vivantojn kune kun la militfalintoj, estas dezirinde ke la Esperantistoj, kaj precipe la Esperantistoj Katolikaj, agu por ke la celoj de la « *Internacia Sonorila Voĉo* » estu dise konata kaj ke per ili la tuta mondo helpu por la starigo de taŭga turo.

Post ne multe la supredirita Komitato disdonos esperantan broŝuron.

Jen dume la poezio de la « Sonorilo de la Militfalintoj »:

*Don... don... don... ĉio tra l' malhum' silentas;  
La paco nur per sonorila voĉo  
la mortintoj sentas*

*Voĉoj mistikaj de murmur' serena  
Inter la tombaj kaj la nigraj krucoj  
pasas solena.*

*De l' Sonoril' el la refrap' mistera  
De ploroj, de singultoĵ forflugadas  
miksaĵo vera.*

*Sur la Mortintoj de l' diversaj landoj  
Larmoj refluas per la rosaj gutoj  
de l' floriglandoj.*

*Dum la frapado la lumplenaj steloj  
Plie briletas pro l' arĝenta voĉo  
en la ĉieloj.*

*Kaj la Falinto eble nun vespere  
Longajn de amo, de milito sonĝojn  
sonĝas subtere.*

*Dum ili dormas unu stel' faliras  
Sur ĉiun krucon, la sonor' silentas,  
la paco spiras.*

Rovereto (Italujo).

Komandoro

Pastro Prof. ro A. ROSSARO

« S. E. il Capo del Governo con telegramma N. 26145 in data 16-VII-1927 ha diramato a tutte le R. Questure, disposizioni per il rilascio dei passaporti agli esperantisti che si sono recati a Danzig. »

« S. E. il Ministro delle Comunicazioni con telegramma N. M. T. 512-20952-11 in data 15-VII-1927, diramato a tutte le stazioni, ha concesso il richiesto ribasso sulle ferrovie italiane ai partecipanti al Congresso di Danzig. »

# FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

FONDATA NEL 1910

Sede ed indirizzo telegrafico } **Viale Giosuè Carducci, 15 - LIVORNO** Per corrispondenza } Casella Postale 204  
Sidejo kaj telegrama adreso } } Per korespondado }  
CONTO CORRENTE POSTALE 5/673 - POSTA ĈEK-KONTO 5/673

Presidente: Generale Marchese Carlo Cordero di Montezemolo (per voto del X Congresso Nazionale, Bari 1925).  
Rinnova tutti gli italiani che, oltre ad essersi formato un concetto della lingua neutra ausiliaria, desiderano contribuire ad estenderne la conoscenza e le applicazioni. Coordina l'azione dei gruppi e delle associazioni che intendono diffondere l'Esperanto ed utilizzarne i vantaggi. Rappresenta gli esperantisti italiani presso il Centro Komitato de la Esperanto-movado, facilita l'opara dell'Universala Esperanto-Asocio (U.E.A., Ginevra, Boulevard du Théâtre, 12; conto corrente postale 3/327, Bologna) e coordina la Cattedra Italiana di Esperanto (Firenze, Via del Neri, 6).

Anno sociale 1926-27

BOLLETTINI n. 10-11

Luglio-Agosto 1927

## Condizioni per l'adesione:

Vedasi il Bollettino doppio N. 1-2 pubblicato nella Itala Esperanta Revuo del novembre 1926, un estratto del quale potrà essere richiesto alla segreteria con biglietto da visita portante le iniziali C. A. (affrancatura cent. 10).

### QUOTE SOCIALI PER I SOCI ISOLATI:

Socio Sostenitore	S	L. 32 (per i già abbonati ad I E R L. 17)
Socio Ordinario	O	L. 26 (per i già abb. ad I E R L. 11)
Socio Aderente	A	quota libera (minimo L. 1 al trimestre).

## I. — COMUNICAZIONI.

— Si richiama l'attenzione su molti inviti, raccomandaz. e domande rivolte ai samid., nei passati numeri, le quali non hanno avuto quasi mai risposta o l'hanno avuta da pochiss. — L'azione della FEI non può evident. esplicarsi se le sue comunicaz. ai Gruppi ed ai soci non sono lette o rimangono inascolt. Preghiamo tutti e special. i sigg. Presidenti e Segretari dei Gruppi ed associaz. federate di leggere attent., i bollettini passati capitoli comunicaz. ed inviare le risposte alle varie richieste di collabor. collett.

— **Schedario FEI.** — Per la compilaz. accurata e completa di questa importante statistica, base di ogni futura azione della FEI, chiediamo a qualche samid. volonteroso per ogni città di assumersi l'incarico di fare riempire il magg. numero possibile di schede da richiedersi alla segreteria. Sarà necessario attenersi *scrupolos.* ai criteri seguenti:

- Usare la massima cura e parsimonia nell'uso delle schede in modo che nessuna vada perduta perchè il numero di stampati disponibili è limitato ed ogni stampato è prezioso.
- Scrivere con carattere stampatello il cognome, in corsivo minuto e chiaro le altre indicaz. usando matita non copiativa tenera, tutte le volte che vi sia incertezza o la calligrafia non sia complet. leggibile.
- Tenere lista delle schede compilate e inviate alla FEI.
- Compilare le schede relative alle persone delle seguenti categorie: 1° Tutti i soci della FEI. di gruppo o isolat. - 2° Tutti gli esperantisti che, non desiderando per qualunque motivo, partecipare attivamente al mov.

acconsentono tuttavia ad iscriversi alla FEI, come soci isolati aderenti al solo scopo di dare ad essa il contributo e l'appoggio morale del loro nome. Per essi sarà sufficiente la quota di L. 1. ed anche una minore.

In tali categ. aderenti alla FEI, per il completamento della statistica dovrebbero rientrare tutti i vecchi esper. appartatisi dal mov., tutti coloro che hanno seguito con relativa assiduità almeno un corso elem. ed in genere chiunque conosca gli elementi della lingua tanto da poterne leggere corrent. e comprendere le frasi più comuni, infine dovrebbero figurare nella statistica indipendent. dal versamento di qualsiasi quota di adesione alla FEI, coloro che per quistioni di principio non partecipano al mov. pur conoscendo la lingua, ed anche i semplici simpatizz. purchè sieno persone di *notevole cultura e assoluta serietà*. A meglio chiarire quest'ultimo punto ed allo scopo di evitare in modo ass. che la statistica si trasformi in una sterile raccolta di nomi, e dia cifre che appaiano astutamente esagerate per un criterio di propag. che sarebbe evident. errato e pericoloso, dichiariamo di intendere per simpatizz. serio colui che, con piena conoscenza di causa e con buon fondamento di cultura, pur non conoscendo la lingua *sappia pienam. valutare, apprezz. e difendere* il fine culturale pratico e patriott. degli Esp. italiani. Per ogni località i nomi di questi simpatizz. da includersi nella statistica devono essere *pochi ed autorevoli*.

— **I samid.** che posseggono piccoli libriccini guida e fogli guida turistici in Italiano (senza alcuna attinenza con l'Esp.) sono pregati d'inviarne una copia alla FEI.

— **Offerte** — Dal Gruppo di Cremona, offerta

globale di L. 300 per UEA., Editore Paolet, Cattedra e FEL, che è stata da quest'ultima così ripartita: UEA. L. 150; Cattedra, Paolet e FEL in ragione di L. 50 ciascuna.

Dall'ing. Mario Muretti di Torino offerta alla FEI di L. 120.

## II. — ATTIVITÀ ESPERANTISTA NELLA PENISOLA.

**Assisi** — Costitut. del Gruppo Esp. Presid. onor. il Podestà di Assisi Comm. Avv. Arnaldo Fortini. Conferenza dell'instancabile samid. Nazareno Boccioni.

**Garda** — Convegno esp. dei samid. di Verona e altre città vicine il 5 giugno u. s.

**Padova** — Convegno interregionale - Presenti N. 39 - città rappresent.: Brescia - Campo S. Martino - Genova - La Spezia - Livorno - Padova - Roma - Torino - Treviso - Trieste - Udine - Venezia - Verona - Vicenza - Estero: Londra e Budapest. La sera del 15 VI riuscitiss. serata presso il Circolo impiegati: recitarono in modo egregio artisti dilettanti un atto della comm. in dialetto padovano: « L'avv. Difensor »; monologhi in dialetto, recitaz. in Esp.; breve conf. sulle finalità e sulle recenti appl. pratiche dell'Esp. tenuta dell'ing. Orengo.

Giorno 16: visita alla Fiera il cui ingresso principale era ornato da una grande bandiera esp. A cura della Fiera stessa venne offerto un rinfresco ai convenuti i quali rimasero gratissimi per l'accoglienza cordiale e per le parole di vivo elogio rivolte dal Presidente della Fiera per l'opera esp. Quindi, i convenuti si recarono in treno speciale a Strà dove, appena giunti deposero, con commosso raccoglimento, una splendida corona di fiori, ai piedi del Monumento ai Caduti. Nel pomeriggio visita alla villa reale di Strà. L'ing. Orengo fece una breve esposizione sull'operato dalla FEI per la presente gestione.

Dell'ottima organizz. del convegno, siano grati tutti al samid. Prof. Saggiori ed ai suoi collab. di Padova e Campo S. Martino. Il convegno era stato annunciato insieme alle altre manifestaz. per il periodo della Fiera nelle tessere di riconoscimento rilasciate dalla Fiera ai propri visitatori.

## III. — NOTIZIE.

A cura dell'Ass. Esp. Veronese e contempor. del samid. Rag. Filippi di Roma, è stata tradotta in Esp. la « Carta del Lavoro ». La FEI ne ha inviato copia a S. E. Mussolini, il quale per tramite del Prefetto di Livorno (con lettera N. 1911 di Gabinetto - 21-VI-1927) ha espresso alla FEI il Suo compiacimento ed i Suoi ringraziamenti.

— L'E. N. S. E. (Ente Nazionale Scolastico Educativo) sotto il patronato della Dante Alighieri e con il consenso di questa FEI ha iniziato la traduz. in Esp. della grammatica Ital.

— Il Consiglio Regionale Scolastico del Piemonte, nella seduta del 15 giugno, sotto la Presidenza del Comm. Prof. Umberto Renda, ha unanimemente approvato l'introd. dell'Esp. nei corsi integrativi della scuola elementare, fra le materie facoltative del gruppo professionale. All'illustre Comm. Renda, a cui in mass. parte devesi quest'importantiss. deliberazione, la FEI è particolar. grata.

— L'Istituto Meschini con l'autorizz. della Cattedra, tiene per corrispondenza un corso di Esp. della durata di mesi 3.

— Il Comitato Nazionale per le onoranze a Enrico Bernardi nell'occasione del primo congresso del motore a scoppio (Padova 16-17 giugno 1927) ha inviato una circolare in Esp. alle Università ed Associaz. Teeniche del Giappone, Cina ecc.

— A Danzica, nell'occasione del Congresso verranno stampate a cura dello Stato, cartoline postali con testo in Esp.

— L'Agenzia di Viaggi « Perlo », di Torino ha pubblicato il programma del congresso di Danzica.

— Il Centra Komitato sta pubblicando le « ŝlosiloj » dell'Esp. in tutte le lingue — E' uscita ora l'ediz. ital.; prossima è quella albanese. Le pubbl. si fanno per offerte e saremmo grati a quei Gruppi o samid. isolati che volessero cooperare a ciò indirizzando le offerte alla FEI (che penserà a trasmetterle al C. K.) con l'indicaz.: « fondo ŝlosiloj ».

## VI. — TURISMO.

— **Espervoko** è il nome di un comitato organizz. di viaggi attraverso l'Austria. I viaggi cominceranno il 12 luglio, il 7 agosto e il 4 settembre e dureranno ciascuno 13 giorni. Itinerario: Salzburg Vienna, Villach, Innsbruck. Prezzo: 375 ŝilingoj austriaci.

— Viaggi in Danimarca e Norvegia saranno organizzati dopo il Congresso di Danzica.

— I Samid. di Padova hanno curato la pubblicaz. d'un ottimo foglio guida edito dall'Enit. sotto gli auspici ed in collaboraz. col Turismo Servo dell'UEA. Richiamiamo ancora una volta l'attenzione dei samid. volenterosi di altre città su questa importante pubblicaz.

## V. — CONGRESSI.

— È prossimo il Congresso Internazionale Esperantista Cattolico (Assisi e Roma. 4-10 agosto) Importantiss. facilitaz. offerte dall'opera Cardinale Ferrari.

— XIX Congresso Esperantista Internazionale (Danzica 28 luglio-4 agosto). L'organizzaz. pratica appare eccellente ed i prezzi di soggiorno sono eccezionalm. convenienti.

— XII Congresso Esperantista Nazionale Italiano (Napoli 3-8 settembre). Gite importantiss. a Capri, Pompei e Campi Flegrei. Prezzi: Hotels 1.º ordine circa L. 80 giornalieri (compreso trasporto bagagli ecc., 2.º ordine circa L. 67; 3.º ordine circa L. 55.

A. Paolet, dir. resp.  
Tipografia Editrice A. Paolet - S. Vito al Tagliamento

Abonoj al « ITALA ESPERANTA REVUO » por 1927:

ITALIA L. 15 — EKSTERLANDE L. 20 — Direkcio: S. Vito al Tagliamento  
(Conto corrente postale 9-392, Bologna)

Ĉiu katoliko — Ĉiu interesato pri Katolikismo nepre abonu

LA MONATAN REVUON ILUSTRITAN

# ESPERO KATOLIKA

FONDITA DE PASTRO PELTIER EN 1903 — Honorita per apostola Beno. 16-paĝa: 27x18 1/2

ENHAVO

Cefartikoloj pri Katolikismo. — Katolika Esperanto-Movado. — Esperanto-Movado.  
Katolika Vivo. — Tra la Gazetaro. — Literaturo.

Jara abonprezo lt. L. 20

Administracio: F-ino LARROCHE - 55, Rue de Vaugirard - PARIS VI.

SKOLTOJ! — Abonu vian organon — monatan — ilustritan

# SKOLTA HEROLDO

Jara abonprezo: lt. L. 5 - Adreso: Pastro Ramboux, 22 Cours Albert 1<sup>er</sup>, Paris VIII

BALDAŬ APERONTA:

# Komerca Vortaro en Esperanto

DE

R. Kreuz kaj A. Mazzolini

Membroj de Lingva Komitato

Arangita laŭ metodo de Kabe — Proksimume 120 paĝoj poŝformato

Prezo lt. L. 12 bindite

ELDONANTO A. PAOLET - S. VITO AL TAGLIAMENTO (ITALIO)

# KATOLIKA MONDO kun aldono La Juna Batalanto

ESPERANTO-ORGANO DE INTERNACIO KATOLIKA — MONATA

ABONO: egalvaloro de 1.25 sv. fr. kvaronjare. - Itala Poŝtĉekkonto: Roma 1/2600

Redaktejo kaj Administrejo: K&LN-Lindenthal (German.)

# INTERESAJ ITALAJ ELDONAĴOJ POR EKSTERLANDANOJ

- « De Alpoj al la maro »: I Kajero: *Italia* (52 ilustraĵoj) . . . L. 2.50  
 » » II Kajero: *Mantova* (18 ilustraĵoj) . . . » 2.50  
 » » III Kajero: *Toskana Regiono* (10 ilustr.) » 2.—
- Gvidlibro tra Venecio, 142 paĝa volumo ilustrita per 23 ĉarmaj bil-  
 doj, kun plano de la urbo kaj arta kovrilo . . . » 8.—
- Gvidlibro tra Trentino, 277 paĝoj, riĉe ilustrita. Itala Svislando, fama  
 somera kaj vintra libertempejo; mondfama regiono por vintraj  
 sportoj kaj kuracado . . . » 4.—
- Assisi, 36 paĝoj, ilustrita. Mirindaĵoj de la Franciscana urbo . . . » 2.—
- Rimini, 40 paĝoj, ilustrita. La belega urbo de la adriatika marbordo . . . » 2.—
- Terni, antikva kaj industria urbo . . . » 1.—
- Gramatiko de Itala lingvo per Esperanto. La gramatiko konsistas  
 el 42 lecionoj, kun itala prononco sub esperanta alfabeto . . . » 18.—
- Vortaro Itala Esperanta . . . » 5.—
- Vortaro Esperanta Itala . . . » 2.50
- « Itala Esperanta Revuo ... Monata revuo, kiu ĉiam enhavas arti-  
 kolojn pri la naturaj kaj artaj vidindaĵoj italaj kaj tradukojn el  
 mondfama itala literaturo . . . » 20.—
- Anekdotoj pri Dante, 24 paĝoj. Historietoj pri la vivo de tiu ĉi  
 mondkonata poeto . . . » 1.—
- La pesto en Milano dum 1630. El « La Gefianĉoj », de Manzoni . . . » 2.—
- De Apeninoj ĝis Andoj, 48 paĝoj. Emociiga rakonto el « Cuore »,  
 de De Amicis . . . » 2.50
- Cavalleria Rusticana, de G. Verga, konata kaj emociiga itala teatraĵo . . . » 2.50
- Pri la devoj de l' homoj, de Pellico; enhavas pensojn ĉiam novajn  
 kaj aktualajn . . . » 3.—
- Ŝakludado, de Giacosa: teatraĵo tre konata en Italio, certe interesa  
 ankaŭ al fremduloj . . . » 3.—
- Vi sola, Esperanto, povas fari tiajn miraklojn!, unuakta origi-  
 nala teatraĵo de A. Ghez, premiita ĉe la X-aj Intern. Floraj Ludoj . . . » 1.50
- Dua ekzercaro, 32 paĝoj. Ŝtoneto de la granda verko de nia majstro  
 Zamenhof. Ĝi enhavas ankaŭ italan tradukon . . . » 1.—
- Parva Grammatica internationalis idiomatis Esperanto, taŭga por  
 pastroj kaj kleruloj . . . » 1.—
- La Reformanto, popola biografio de S. Francisko el Assisi, de Prof. P.  
 M. Caroli, dua eldono, kun antaŭparolo de Prof. F. Pizzi (17 ilustr.) . . . » 6.—
- La Floretoj de S. Francisko, antikva monumento de Itala literaturo,  
 trad. de Prof. F. Pizzi (sur dika papero) . . . » 8.—
- La Padova Lilio (Mallonga biografio de S. Antonio el Padova), de  
 Prof. Caroli, ilustrita . . . » 5.—

(AFRANKITE)

Eldonanto A. PAOLET - S. VITO AL TAGLIAMENTO (Italia)